Nuntempa
BULGARIO
Jaro VI, n-ro 9

REMEMOROJ pri ANTONI GRABOVSKI

de inĝ. Sygmunt GRABOWSKI, Wroclaw

El la tuta familio de mia patro, Antoni Grabowski, restis vivanta nur mi. Mia plej aĝa fratino Irena ankoraŭ travivis la Varsovian Ribelon en 1944, por fini poste sian vivon en la punkoncentrejo Ravensbrück. La pli junaj du fratoj kaj fratino mortis junaĝe malonge post la Unua Mondmilito, pli malpli en unujaraj intervaloj. Mia patrino, 78-jaraĝa maljunulino, post la Varsovia Ribelo mortis en Krakovo la 28-an de septembro 1944, kiel unu el la nenombreblaj viktimoj de la pasinta milito.

Mi deziras — laŭeble — reliefigi tiujn trajtojn de mia patro, kiuj — ekster liaj talento kaj kapablo en diversaj sciencobranĉoj — estis gajnantaj por li la simpation kaj amikecon de homoj el plej diversaj medioj kaj naciecoj.

Li estis homo tre simple sincera kaj verama. Li ne toleris mensogon, falson kaj hiporkriton. Fremda al li estis pozado aŭ artifika, afekta konduto. Dank' al siaj grandaj scioj li komprenis homojn tute malaltnivelajn, interesiĝis pri ilia vivo, kapablis ensentiĝi en iliajn zorgojn, penadojn kaj travivaĵojn, kaj — ĉar li havis bonan, kunsenteman koron — li ne malofte servis al ili per helpo. Ĉiam li estis homo modesta, kaj — malgraŭ siaj grandaj atingaĵoj, plena materiala sendependeco kaj altaj postenoj, kiujn li dum sia vivo okupis — li restis ĝisfine alirebla, modesta, natureca.

Por sia familio li ĉiam estis la plej zorgema patro kaj protektanto, travivis kun siaj idoj iliajn ĝojojn kaj tristojn, estis neanstataŭebla konsultanto kaj helpanto en ĉiuj aferoj.

Memorkapablon li havis neordinaran — koncerne plej diversajn sferojn. Fariĝis kutimo ĉe la parencaro, konatuloj kaj amikoj, ke ili venadis por ke li solvadu iliajn dubojn kaj donu konsilojn en diversaj aferoj. Aŭtoritatecon mia patro ĝuis grandan.

Li distingiĝis per mirinda modesteco, neniam li iun neglektis, en siaj juĝoj li estis justa. Havante karakteron pure noblan, li ne povis toleri malveron kaj trompon; tiaokaze li estis nerepacigebla.

— — —

Antoni Grabowski naskiĝis la 11-an de junio 1857 en negranda bieno de siaj gepatroj en Novo-Dobre, distrikto Chelmno (Helmno) en Pomerania.

Sekve de diversaj malfavoraj cirkonstancoj (i. a. inundo detruinta rikolton, inventarion kaj konstruaĵojn) liaj gepatroj kun restaĵeto de financaj rimedoj translokiĝis al Torun, kie mia avo Franciszek (Franciŝek) fariĝis instruisto. La materialaj kondiĉoj de la familio malboniĝis. Nur ĉe granda ŝparemo la geavoj, havante 9 infanojn, povis ekzistadi.

Mia patro, fininte la elementan lernejon — la tiaman

„Bürgerschule", estis lokigita de sia patro en librovendejo por lerni la librovendistan profesion, por kiu tiutempe (estis ja antaŭ pli ol 80 jaroj) oni ne bezonis trapasi gimna-

zian studon. Juna, kapabla kaj ambiciema, kia li estis, li ne povis paciĝi kun la penso, ke li ne plu studu, kaj sekve li komencis akiradi por si la necesajn lernolibrojn — por ke li dum vesperoj, je kosto de dormado kaj ripozo, sin preparu memstude por ekzameno al ŝtata gimnazio, kie la instrulingvo estis la germana.

En la tiama tempo estis por gimnazianoj devige, krom la germanan, lerni ankaŭ la latinan, grekan, anglan kaj francan lingvojn. Estis kompreneble, ke ankaŭ aliaj lernobjektoj staris je multe pli alta nivelo ol en la lernejo, kiun li estis fininta; krome, oni instruis ankaŭ aliajn novajn objektojn, ne ampleksitajn en la programo de la antaŭa lernejo.

Longan vicon da monatoj daŭris la sinpreparado por la sopirata gimnazio.

Kiam fine mia patro sin anoncis ĉe la direktoro, por ke oni lin ekzamenu — li aŭdis, ke li estas „tro maljuna", ĉar li estis jam 18-jaraĝa, kaj la antaŭvidita aĝo de knaboj por tiu klaso estis maksimume 17 jaroj. Insiste petate kaj vidante la fervoron de la junulo, la direktoro tamen konsentis allasi lin en la gimnazion — kondiĉe, ke la ekzamenoj rezultos per „bone" kaj dum la unua jarduono li havos nur bonajn notojn.

Laŭ rakontoj de mia patro mi scias, ke dum sia lernado en la gimnazio — malgraŭ ke li devis vivteni sin per helplecionoj al siaj malpli kapablaj kolegoj, li estis dufoje avancigita en pli altan klason en daŭro de la sama lerneja jaro.

Post kiam li fariĝis abituriento de la gimnazio en Torun, li studis en la jaroj 1880—1884 natursciencon kaj kemion ĉe la Vroclava Universitato, kie li ricevis la diplomon de inĝeniero-kemiisto.

Dum siaj universitataj studjaroj li estis aktiva membro de la Slava Societo en Vroclavo, ariginta tiame studentan junularon polan (precipe), ĉeĥan kaj rusan.

Post aplikado, kiun li estis farinta parte en Pollando (Zawiercie) kaj poste en Ĉeĥoslovakio, mia patro prenis ĉirkaŭ la jaro 1885 postenon de direktoro en granda teksajfabriko en la rusa industria urbo Ivanovo-Voznjesensk (en la tiama Vladimira gubernio). Dank' al sia grandega laboremo, organiza talento kaj sperto pri kolorigado de kotonproduktaĵoj, li eltiris la fabrikon el preskaŭ komplete marasma stato kaj starigis ĝin post kelka tempo en la unuan vicon de sambranĉaj entreprenoj.

En majo 1892 mia patro edziĝis al Bronislawa Rózycka, fraŭlino tiutempe tre instruita, lerninta en Varsovio ĉe famaj profesoroj. Mia patrino estis persono, kiu havis tutan vicon da interesoj pri historio, literaturo kaj arto. Ĝis la fino de sia vivo mia patrino estis inda kaj fidela vivkunulino de tiu senlaca aganto kaj homo de grandaj menso kaj koro.

— — —

En la jaro 1887, survoje el Ruslando al Varsovio, en unu el la fervojstacioj, mia patro aĉetis broŝuron „Lingvo Internacia", subskribitan per la pseŭdonimo D-ro Esperanto. La broŝuro enhavis vortareton kaj gramatikajn regulojn de tiu lingvo. Frapita de la genia klareco kaj facileco de vortformado, mia patro decidis eklerni ĝin. Por proksimiĝi al la lingvo kaj lerni flue ĝin regi, li tradukis la novelon de Puŝkin „Neĝa Blovado" („Mjetjel"). Estis la unua novelo traduke verkita en Esperanto.

La persono de la aŭtoro de la menciita broŝuro kaj de la internacia lingvo tre ekinteresis mian patron. Post multa serĉado li sciiĝis, ke kreinto de la nova internacia lingvo estas la okulkuracisto D-ro Ludoviko Zamenhof, loĝanta en Varsovio, ĉe str. Dzika n-ro 9 (post multaj jaroj tiu ĉi strato ricevis la nomon de Zamenhof).

En tiu loĝejo (en kiu poste mi, ankoraŭ knabo, ne unufoje vizitadis kun mia patro la Majstron Zamenhof) okazis en la jaro 1888 la en historio de Esperanto unua interparolo en tiu ĉi lingvo inter la du entuziasmuloj pri la ideo de lingvo internacia. Jam tiame ili kredis, ke ĉi tiu lingvo trakuros ĉiujn landojn kaj servos al interkompreno kaj proksimiĝo reciproka de la nacioj.

Mia patro, kiu estis vera poligloto (li konis kaj regis pli ol 20 lingvojn), konis ankaŭ la pli fruan ol Esperanto internacian lingvon Volapük. Li vizitis la aŭtoron de tiu lingvo — la pastron Schleyer (Ŝlajer). Mia patro konvinkiĝis, ke tiu ĉi ekstreme malfacila kaj komplika lingvo estas praktike ne akceptebla, ĉar eĉ ĝia aŭtoro mem dum la interparolo devis ĉiumomente uzi la vortaron.

En la jaro 1904 miaj gepatroj translokigis sian hejmon por konstante loĝi en Varsovio, kie mia patro restis ĝis sia morto, t. e. ĝis la 4-a de julio 1921.

Same tiel de 1904 datiĝas la fondiĝo de la Varsovia Societo Esperantista, kies prezidanto fariĝis mia patro. Kelkajn jarojn poste ekestis Pola Esperanto-Societo.

Tiutempe Antoni Grabowski vivigadis la en Varsovio eldonatan monatan revuon „Pola Esperantisto" ne nur per la materialoj prilaborataj de li mem, sed ankaŭ tre konsiderinde subvenciis la gazeton el siaj propraj monrimedoj. Samtempe mia patro kunlaboris kun tuta vico da tiame aperantaj esperantaj periodaĵoj diverslandaj, en kiuj publikiĝis liaj poeziaĵoj kaj artikoloj.

Multaj estis tiam la venkotaj malhelpoj, ne sole financaj, por ke la gazeto estu sur deca nivelo kaj aperadu je ĝustaj datoj.

Kelkajn jarojn da streĉa laboro dediĉis mia patro al la esperanta vorttrezoro — al kreo de granda vortaro, kaj pli ĝuste — de du grandaj kaj malgrandaj vortaroj Esperanto-polaj kaj pola-esperanta. Tio estis laboro grandega kaj temporaba, postulanta egan paciencon, kun la destino servi al la polaj esperantistoj por plua estonteco. Dediĉante la plejparton de siaj fortoj kaj tempo al laboro pri evoluo de Esperanto, mia patro — laŭinklina filologo, en la kvieto de sia kabineto-laborejo, ĉirkaŭite de libroj, kun plumo enmane — senprofite rezignis pri materialaj gajnoj, kiujn povus doni tiaspeca laborado, por la bono de celoj malproksimaj kaj idealaj kaj precipe — por la granda ideo de la internacia lingvo Esperanto.

Lia filologia inklino, apudestanta kun granda amo al la pola lingvo, kaŭzis, ke li fariĝis unu el plej aktivaj membroj de la Komisiono por Pola Terminaro ĉe la Teknikista Societo en Varsovio.

Antoni Grabowski akiris grandajn meritojn ĉe la laboro pri poligo de la kemia kaj teknika terminaroj sciencaj puriginte ilin de barbarismoj kaj fremdlingvaj herbaĉoj. — Nun, post multaj jaroj pasintaj, kemiistoj kaj teknikistoj oftfoje aplikas pollingve ĝenerale uzatajn esprimojn, tute nesciante, ke tiuj por polo klaraj kaj konvenaj terminoj eliris sennome el la krea kapo de Antoni Grabowski.

Pridotita per bonega gusto kaj ekzakta intelekto, li fariĝis tre ŝatinda kunlaboranto kaj honora membro de la Esperanto-Akademio en Parizo, gardanta la unuecon de la Internacia Lingvo surbaze de la Zamenhofa fundamento. Mi memoras, ke la tagon de la enterigo de mia patro ankoraŭ alvenis letero de la Akademio el Parizo — kun peto pri lia ĉiam valora konsilo en aferoj de la lingvo Esperanto.

Profundaj scioj kaj kono de la mondliteraturo permesis al Antoni Grabowski krei antologian volumon „El Parnaso de Popoloj", en kiu la plej valoraj poeziaj verkoj, bonaguste elektitaj el 30 lingvoj kaj dialektoj, ĉiuj pietisme tradukitaj el la originaloj, fariĝis perloj de la Esperanta poezio, atingeblaj por ĉiuj popoloj de la mondo.

En „El Parnaso de Popoloj" per genia melodio de la originaloj sonas: la braveca balado de Mickiewicz, (Mickje-

Kamparanribelo

(El la ciklo „Jaro 1905“)

de Elvira Lippe

Kamparanribelo

Kamparano.
Kamparano
ekribelas subpremita.
Mortis humileco hunda.
Flamas nur malam' profunda.
Dors' rektiĝas kurbigita.

Ne por kisi la manikon,—
por forigi la radikon
de satano,
kamparano
al bienpalaco venas.
Manoj tenas
ĉu forkegon, ĉu draŝilon,
ĉu palison, ĉu falĉilon ...

Mateniĝas. Sur la placo,
kie staris la palaco,
gapas traboj karbiĝintaj.

Esplordemandado

Ankoraŭ kiu? Kial? Kiam? Kie?
Demandoj hajle batas pli kaj plie.
Jes, demandanto bravajn homojn ŝatas,—
la buŝ' kun truaj dentoj dolĉe flatas.
Lipharojn siajn li senĉese tordas
kaj palpebrumas li kaj lipon mordas.

La demandata viro mutas ŝtone.

Sed bat' la demandanton trafas bone.
Sur plank' baraktas kruroj etenditaj,
en botoj brile puraj kaj spronitaj.

Skurgado

Justecon serĉis kaj aspiris vi?
Abunde, en fojnejo de barono,
oni dividas ĝin nun laŭ ordono,
de lia moŝt', laŭ lia opini'.

Skurĝoj fajfas,
skurĝoj siblas,
skurĝoj falas kaj leviĝas.
Sango gutas,
Sango fluas
sango kun la ŝvit' miksiĝas.
Karno tremas,
karno ŝvelas,
karno viva ĉifoniĝas.

Ankoraŭ fluos sango pro justec',
pereos miloj kaj triumfos morto,
sed ne perdiĝos subpremita forto
kaj venkon, tamen, portos estontec'.

Reveno

Ĉevalo hejmen malrapide paŝas.
La mastro iras apud veturilo,
en kiu stria, lana litkovrilo
sub si zorgeme karan ŝarĝon kaŝas.

Ĝisatendinte ilin, hundo ĝojas.
Subite ĝi ekflaras, ekspirblovas,
la voston inter postpiedojn ŝovas,
longsone kaj hurlante ĝi ekbojas.

Sed polva tero sub la veturilo
pro pezaj gutoj ruĝa malsekiĝas.
Pordeg' knaranta vaste malfermiĝas —
el bienjuĝ' revenas hejmen filo ...

viĉ) pri Twardowski, pola krakovjako (dancspeco) popola, delikata franca versaĵo de Verlaine (Verle'n), amkantoj de Heine (Hajne) kaj Dante, la anglaj „Sonoriloj“ de Moor, usona vek-signalo de Longfellow (Longfelo), ukraina motivo de Ŝevĉenko, latina odo de Horaco, greka strofo de Eŭripido, japana uto, provencana kanto kaj multaj aliaj.

Ĝis kiam liaj sanstato kaj fortoj tion permesis, mia patro ĉiam persone partoprenis en la Universalaj Kongresoj de Esperanto: en Bulonjo, Barcelono, Dresdeno, Antverpeno, Krakovo kaj aliaj.

Por inaŭgura kunsido de unu el la Kongresoj li verkis originalan kantaĵon honore al la lingvo nome „La Tagiĝo“, kiu poste estis ĥorkantata ĉe pluraj Universalaj Kongresoj.

Por la 8-a Universala Kongreso de Esperanto en Krakovo 1912 (al kiu li kunprenis ankaŭ min), mia patro tradukis la operon „Halka“ de Moniuszko (Monjuŝko) kaj la dramon „Mazepa“ de Slowacki. Ambaŭ verkoj estis tiam kun granda sukceso prezentitaj en Esperanto en la Slowacki-Teatro fare de niaj plej bonaj tiamaj profesiaj aktoroj. Ĝis hodiaŭ mi havas enmemore la krakovan teatron plenplenigitan de di-

versnacia homamaso esperantista — reprezentantoj de kelkdeko da landoj — aplaŭdanta la ludon de la aktoroj kaj elvokanta poste ĉe la scenejo la tradukinton.

Krom „Mazepa“ — mia patro tradukis: „La Patro de Pestuloj“ kaj „En Svisujo“ de Slowacki, „Pekoj de Infaneco“ de Prus, „La Gefratoj“ de Goethe, „Ŝi la Tria“ kaj „Janko la Muzikisto“ de Sienkiewicz (Sjenkjeviĉ), „Consilium Facultatis“ (Malsanulo pro stranga imago) de A. Fredro.

El la originalaj verkoj de mia patro decas mencii — krom „La Tagiĝo“: la belan elegion „La Reveno de l' Filo“ kaj „Saluto el Varsovio“. Li prilaboris ankaŭ la librojn „La Kondukanto“ kaj „Antologio Internacia“.

Kiam eksplodis la Unua Mondmilito, mia patro troviĝis ekster la limoj de la lando kaj jam ne povis reveni Varsovion.

Intertempe nia tuta familio forveturis en Ruslandon. Kiam la germanoj en 1915 okupis Varsovion, li revenis, sed trovis la hejmon senhoma. Li sentis tiam peze la solecon, kaj la progresanta kormalsano rompis lin fizike.

Tiam la sola konsolo estis por li ofta vizitado al D-ro Zamenhof kaj laboro pri la tradukado de „Sinjoro Tadeo“. La enkonduko kaj la unuaj paĝoj estis jam pretaj. Esperantistoj, kaj ĉefe la Majstro Zamenhof, kiu esprimis admiron pri tiom bela traduko, penis influi mian patron, ke li daŭrigu sian laboron pri „Sinjoro Tadeo“. Malgraŭ la malsano, li decidis plu labori por fini ĉi tiun grandan verkon. Tamen nur en 1918 — mallonge antaŭ ol revenis la familio — la traduko estis finita.

Pri tio, kia estas la traduko, ne mia afero estas esprimi juĝon. Konataj estas la opinioj kaj eldiraĵoj ĉi-koncernaj de aliaj personoj.

Siajn antaŭajn verkojn esperantajn mia patro estis ĉiam eldonanta je siaj propraj kostoj, same la monatan revuon „Pola Esperantisto“ grandparte li financis persone — kun ioma helpo de kelkaj Esperanto-entuziasmuloj. En la momento tamen, kiam li estis fintradukinta la poemon „Sinjoro Tadeo“, li ne plu havis la financajn rimedojn por preseldoni ĝin. Tial do varsoviaj esperantistoj dividis inter si la eldonkostojn kaj impostumis sin mem por la preso kaj paperaĉeto.

Kiam antaŭ la fino de 1918 la familio revenis Varsovion, ĝi trafis la patron fizike malforta kaj submetiĝanta al oftaj atakoj de angino brusta (angina pectoris).

Malgraŭ tio, ĝis sia lasta vivmomento li ne ĉesis labori por Esperanto.

Antoni Grabowski mortis subite pro koratako la 4-an de julio 1921, kiam li staris antaŭ vitrino de la librovendejo de Borkowski ĉe Marszalkowska strato en Varsovio, kie estis elmontrataj esperantaj libroj.

— — —

La 5-an de junio 1933 la VI-a Tutpopola Kongreso Esperantista en Varsovio fondis kaj solene enmurigis je la domo ĉe str. Hoja 42 en Varsovio memortabulon kun la jena surskribo pollingva:

„En tiu ĉi domo loĝis kaj laboris Inĝ. Antoni Grabowski—senlaca disvastiginto de la ideo de lingvo internacia, genia tradukinto de „Sinjoro Tadeo“ kaj de aliaj ĉefverkoj de la pola literaturo en Esperanto.“

En 1941 la german-faŝistaj aŭtoritatoj en la okupata Varsovio ordonis deŝiri kaj detrui la memortabulon.

La nomo de Antoni Grabowski tamen restos en la historio de la Esperanto-movado enskribita per oraj literoj.

Ĉi tiun iomon da rememoroj pri mia amata kaj neforgesebla patro mi omaĝe dediĉas al lia memoro.

ILIA AFERO triumfos

de ASEN GRIGOROV

„...Kiu pereas por la libero, mortas neniam!“

Hristo Botev

Ofte sur la paĝoj de „Nuntempa Bulgario“ ni konigis al la tutmonda esperantistaro faktojn el la rezistado de la bulgara popolo kontraŭ la faŝismo. Jam multaj el niaj legantoj scias pri la amasa lukto de la bulgara popolo kontraŭ la germanaj okupantoj kaj ties bulgaraj agentoj kaj helpantoj. Sed ne multaj scias, ke ankaŭ la esperantistoj ne staris flanke de la tutpopola lukto, ke multaj el ili estis sur la fronta loko de tiu ĉi lukto.

Longa estas la listo de la pereintoj. Nikola Ŝopov, David Sasonov, Penka Miĥajlova, Stojan Edrev, Angel Petkov kaj multaj aliaj esperantistoj, konataj kaj nekonataj, pereis dum la rezistado 1941—1944.

La Esperantista Societo „Stoju Kalpazanov“ en la sudbulgara urbo Velingrad organizis celebradon de la datreveno de l' mortigo de sia patrono, de la juna esperantisto Stoju Kalpazanov, kaj de la nacia heroino Vela Peeva, ankaŭ esperantistino. Kiam oni invitis la redakcion de „Nuntempa Bulgario“ sendi sian reprezentanton, mi esprimis la deziron ĉeesti la celebradon, ĉar similan iniciativon mi antaŭe ne partoprenis. Mi tamen ne supozis, ke ĉi tiu celebrado transformiĝos en manifestaĵon de la forteco kaj alta idea spirito de nia movado en la regiono de Velingrad.

Neĝo en la monto

La prognozo de la meteorologia servo pri malbona vetero ĉi tiun fojon estis mirige ĝusta. La tutan nokton antaŭ la tago de l' soleno pluvis. La potenca montosupro „Ĉernovec“ en la Rodopimontaro ne estis videbla pro nebulo kaj pluvo. Sed sur la kolektiĝa loko — la centra placo de Velingrad — jam frumatene svarmis amaso da esperantistoj, turistoj, respektantoj de la pereintaj herooj. Ĉi tie ĉeestis reprezentaj grupoj de la Esperanto-societoj en la proksimaj urboj Plovdiv, Pazarĝik, Peŝtera kaj aliaj lokoj. La lernantoj de la gimnazio „Vela Peeva“ el Velingrad en kolono ekiris al la monto.